

Leterkesto, 3-a parto : Günter Becker
Claude Gacond, 336-a radioprelego, 1970.01.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la du pasintaj semajnoj ni malfermis nian leterkeston por iomete babili kun niaj geaŭdantoj. Hodiaŭ ni dediĉas trian kaj lastan elsendon por respondi al la geaŭdantoj, kies leteroj ankoraŭ troviĝas en nia leter-kesto.

A.- Sinjoro Fritz Liechti en Zürich, Svislando, sendis al ni informojn pri la evoluo de la planita Internacia Evangelia Radiostacio. La laboro de la komitato, kiu celas la starigon de tiu radiostacio, nun ricevis la apogon de evangeliaj eklezioj en dek-unu landoj.

Cl.- Tiu komitato aperigas inform-bultenon. Esperanto estas unu el la lingvoj, en kiuj tiu *EPI-bulteno*, jen ĝia nomo, estas eldonata.

A.- Por konstrui Internacian Evangelian Radiostacion oni bezonas monon. Pro tio la sekretario por la Internacia Evangelia Radiostacio, kiu oficas en Bern, dankas la donacintojn per donac-atestiloj, kiuj baziĝas sur la svisa mono. Estas kuponoj por cent svisaj frankoj, aliaj por kvincent, mil aŭ kvinmil svisaj frankoj.

Cl.- La Komitato por la Internacia Evangelia Radiostacio eldonis kasedan sonbendon kaj diskon kun evangelia programo.

A.- La protestantoj, kiuj ŝatus ricevi pli precizajn informojn pri la laboro de la komitato por Internacia Evangelia Radiostacio povas skribi al Radio-Svislando, petante, ke ni transdonu ilian informpeton al la sekretario en Bern aŭ al sinjoro Fritz Liechti en Zürich.

Cl.- Sinjoro Werner Schaufelberger, ankaŭ en la urbo Zürich, sendis al ni salut-vorton, kie li raportas pri sia aŭskulto de niaj radio-prelegoj.

A.- Por resti en la regiono de Zürich ni raportu pri la Esperanto-Rondo de la psikiatria kliniko en Wil, kiu, sub la dinamika gvidado de sinjoro Hans Kästli, plenumas pioniran eksperimenton.

Cl.- La plur-lingveco estas pli kaj pli problemo en Svislando, ĉar al la nacia kvar-lingveco aldoniĝas la plur-lingveco de la fremdaj laborantoj : italoj, hispanoj, jugoslavo, grekoj.

A.- Sub la pozitiva influo de sinjoro Hans Kästli kreiĝis en la psikiatria kliniko de Wil, apud Zürich, esperanto-rondo. Tiel esperanto povis ekludi la rolon de inter-lingvo.

Cl.- Kaj por varbi novajn flegistojn tiu kliniko ekuzis esperanton. Tiel aperis anonco en la revuo *Esperanto* de UEA. Se ni ne eraras kvar esperantistoj respondis kaj esti dungitaj. Okaze de partopreno al la Ĝenerala Kunveno de Esperanto-Societo Zürich ni povis renkonti junan briton, kiu ĵus komencis labori en tiu kliniko en Wil.

A.- Nun en tiu kliniko dudeko da geflegistoj lernas esperanton. Tiu eksperimento certe vekos la atenton de la ĵurnalistoj, kaj poste de la direktoro de aliaj institucioj : hospitaloj, fabrikoj, firmoj, kie la laborantoj ne komprenas komunan lingvon.

Cl.- Labor-estro de granda garaĝo foje rakontis al mi pri la danĝero de la multlingveco. Kiam danĝero minacas la laborantojn simpla krio « *Atentu !* » ne vekas la saman reagon ĉe la laborantoj. Dum la sam-lingvanoj forkuras, la aliaj simple levas la kapon por vidi, kio okazas. Dum tiuj gravegaj sekundoj ofte okazas akcidento. La peza feraĵo falas sur la laborantojn, kiuj ne komprenis, ke oni krias **atentu !**

A.- Sed esperantigi laboristaron ne estas eta afero. Pro tio ni rigardas kun granda intereso la pioniran laboron de Hans Kästli. Ni esperas povi viziti tiun psikiatrian klinikon, kaj post tiu

vizito raporti al vi iom pli detale pri la sukcesoj kaj problemoj de tiu eksperimento. Atendante ni salutas la esperantistajn geflegistojn en Wil nome de Radio-Svislando.

Cl.- Nun ni havas ankoraŭ tri leterojn de sinjoro Günther Becker en Blieskastel, Okcidenta Germanio. El liaj leteroj ni citas :

A.- « [...] *Mi ŝatus per kelkaj linioj okupiĝi pri via elsendo de la 29-a de oktobro 1969, kiun mi bone povis kapti je la 49-metra bendo. Ĝi tiel interesis min, ke mi provis reaŭskulti ĝin la sekvantan sabaton por povi ĝin surbendigi. Tamen, ĉar mi estis en alia loko, mi fakte malsukcesis kaj povis nenion kapti, kio nun devigas min laŭmemore skribi pri la laŭ mi ne tre pozitivaj punktoj de la elsendo.* [...] »

Cl.- *Gesinjoroj, kiuj ja diris, ke ili ne vizitas Universalajn Kongresojn, tamen raportis pri tiu de Helsinki en tute alia maniero ol la tri aliaj radio-stacioj, kiuj parte sendis plurajn profesiajn radio-redaktorojn kaj el kiu unu eĉ raportis ĉiutage rekte.* »

A.- Sinjoro Günther Becker poste diras, kion li ne ŝatis en nia raporto aŭ kritiko. Ni unue konstatis, ke ekzistas granda malfacilaĵo esti akurate informita pri la esperantistaj manifestacioj. Kaj ni diris :

Cl.- « Eĉ pri la Universala Kongreso la informa servo ne kapablis liveri freŝajn novaĵojn, kiuj estus permesintaj redakti radio-kronikojn aŭ gazet-artikolojn. Ni ne forgesu, ke radio kaj gazetoj emas raporti pri aktualaĵoj. Se la novaĵoj datas de du semajnoj, ili perdis sian valoron profite al pli freŝaj novaĵoj. Ĉiu lando havas sian novaĵ-agentojn, kies rolo estas diskonigi al gazet-eldonejoj kaj radio-dissendejoj la aktualaĵojn. Bedaŭrinde Esperantio ne ankoraŭ kapablis starigi similan agentejon je la profito de siaj ĵurnalistoj kaj radio-kronikistoj. Estas granda manko, kiu estas unu el la kaŭzoj de la stagneco de la esperanto-movado. »

A.- Pri nia nepartopreno en la Universala Kongreso ni diris :

Cl.- « Persone ni neniam havis la okazon partopreni Universalan Kongreson de UEA. Ni do povas paroli pri tiu manifestacio nur kiel eksteruloj, kiujn informas la oficialaj raporto unuparte kaj la individuaj raporto de kongresanoj aliparte. » (Fino de la citaĵo.)

A.- Sinjoro Günther Becker sciu, ke farante tiun kritikon, ni volas lumigi mankon. Ne estas al la ĵurnalistoj, radioj iri al la esperantistoj por ricevi informojn, estas al la esperantistoj iri al ili.

Cl.- Kultura Centro Esperantista, kiu kreiga en Svislando, troviĝas antaŭ ege kompleksa tasko, nur ĉar la ĝenerala publiko ne estas informata pri esperanto, ĉar ĝis nun informado pri esperanto estas, ni devas tion agnoski, tre malbone organizata.

A.- Sed sinjoro Günther Becker faris aliajn kritikojn al ni. La venontan semajnon ni legos liajn kritikojn kaj relegos niajn dirojn. Temas pri la Rezolucio de la Universala Kongreso okazinta en Helsinki.

Cl.- Vi aŭdis amikan babiladon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-